

“Eble ne” Alicio respondis iom singarde “tamen, lernante la muzikon, mi ĉiam devas tempbati.”<sup>1</sup>

“Ha, jen la kaŭzo” diris la Ĉapelisto. “Li ja ne ŝatas tiun batadon. Se vi nur volus esti pli agrabla, li preskaŭ ĉion farus pri la horloĝoj laŭ viaj preferoj. Ekzemple, ĉe la naŭa matene, kiam vi devas komenci la lecionojn, vi nur devus murmuri al li vian deziron, kaj jen la indikiloj tuj montrus la unuan horon kaj vi havus la tagmanĝon.”

“Tio estus agrabla, certege” diris Alicio. Tamen, profundiginte en pensojn, ŝi poste aldonis:

“Sed en tiu okazo, mi ja ne estus preta por la manĝo, mi ne estus malsata!”

“En la komenco, eble ne” diris la Ĉapelisto “sed vi povus teni la horloĝon ĉe la unua, ĝis vi *fariĝus* malsata.”

“Ĉu vi tiel mastrumas ĝin?” Alicio demandis.

La Ĉapelisto malĝoje svingis la kapon. “Tion ne mi” li respondis “ĉar li kaj mi malpaciis en la pasinta Marto, ĵus antaŭ kiam *tiu* freneziĝis (montrante per sia tekulero al la Martleporo). Ĝi okazis ĉe la granda

<sup>1</sup> Jen alia dusencaĵo: Alicio intencis esprimi “laŭtkalkuli la taktojn,” sed la Ĉapelisto komprenis, aŭ ŝajnis kompreni “bati Tempon.”

koncerto kiun organizis la Kera Damo. Mi devis kanti:

*Twink'l, Twink'l! Vesperteto  
Kia via afereto?*

Vi kredeble konas tiun kanton?”

“Mi certe aŭdis ion similan” diris Alicio.

“La daŭrigo” diris la Ĉapelisto “estas jena.”

*Tra l' aer' vi ŝovas vin  
Majeste, kiel anasin'.  
Twink'l, Twink'l! . . .*

En tiu momento la Gliro skuis sin kaj komencis dormkanti:

“*Twink'l, twink'l, twink'l.*” . . . Ĉar laŭŝajne ĝi havis la intencon daŭrigi sen fino tian twink'ladon, oni pinĉis al ĝi la orelojn por ĉesigi ĝin.—

— “Nu, apenaŭ mi finis la unuan version” diris la Ĉapelisto, “la Kera Damo eksaltis kaj laŭte kriegis: ‘Li mortigas la Tempon; oni senkapigu lin.’”

“Ho, la kruela sovaĝulino” ekkriis Alicio.

“Kaj de post tiu tago ĝis nun” la Ĉapelisto malgaje daŭrigis “la Tempo ĉion rifuzas al mi. Ĉiam konstante li nun donas al mi la sesan posttagmeze.”

Vere frapanta ideo venis al Alicio. “Jen la kaŭzo, ĉu ne, pro kiu mi vidas sur la tablo tiom da temanĝiloj?”

<sup>1</sup> Angla vorto kiu signifas “lumi kiel steloj lumas,” “brili intermite.”